E. Drezen — Sur la vojoj al la Lingvo Internacia. Ŝtata eldonejo de RSFSR. Moskva 1926

Tiu libro de 168 paĝoj havas tute originalan karakteron kaj konsistas el 15 artikoloj de 11 diversaj aŭtoroj:

La redaktoro de la libro — „nostro consocio" — Generala Sekretario de Sovetlanda Esperantista Unio — Drezen estas aŭtoro de du artikoloj pri ~~filozofio~~ scienco lingva ĝenerala kaj pri mallonga historio de Lingvo Universala.

Ĉiuj artikoloj estas verkitaj de vidpunkto sociologia kaj marksista.

Artikoloj pri historio de Esperanto prezentas la klasbatalo[n] inter la esperantistoj.

Granda atento estas dedicata al apliko de Esperanto por internacia laborista movado. Faktoj citataj montras ke speciale en tiu medio L.U. havas grandan progreson. Espera[nto] praktike aplikata en lernejoj, en rondoj de radioamatoro

ce blindulој, postis тој estas temoj de aliaj art-Koloj

Malnova veterano de Esperanto. N Evstifeieff provas defendi per ekzemploj el bolŝpriК, Ido K.a.; Ke Esperanto eleka la „mezan – oran vojon" por sia evoluo.

Speciale estas Kritikata la tro sciencа gramatiKemo de „Ido" – tute nenecesa Kaj malutila por lingvo simpleco.

Tiurilate la tendencoj de nov-latinistoj estas tute Komprenebla: Oni Konsideras „Interlingua" Kaj „Latino sine flexione" Kiel lingvoj de moderna Eŭropa Kulturo, Kiuj estas Kompreneblaj „adprima visto" por ĉiuj civilizitaj eŭropanoj; sed oni opinias Ke la skemati simpleco Kaj „elementareco" de Esperanto estas la Kaŭzo Kial ĝi estas bone akceptata de pli malkleraj laboristaj masoj Kaj en oriento.

2/ Oni konsideras Esperanton kiel lingvon ne de sciencistoj sed de masmovado, eble eĉ de revolucia masmovado.

Tiuj konsideroj estas originale kaj bone argumentitaj: Tuta libro estas plena de citoj el verkoj de Marx, Lenin k.a.

Malaprobata estas laboro de la pacifistaj neutralaj esperantistoj, kiun kontraŭbatalas la marksistaj esperantistoj.

Rusiaj esperantistoj devas esti gratulataj pri la apero de tia seriosa verko, eldonita de la Ŝtata eldonejo.

---